Johann Wolfgang von Goethe,

# Noktolido de migranto

*tradukita de Richard Schulz*

Vi, sendito de l' chiel',
Foriganto de doloro,
Antau kies brila hel'
Forsekighas chiuj ploroj,
- Ve pro la adado laco,
Kia de la faroj fin'? -
Dolcha paco,
Nestu do en mia sin'!

*Traduko de la Germana poemo "Wanderers Nachtlied" de* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* RICHARD SCHULZ *(Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26).*

*Arg-738-1490 (2013-02-26 15:13:51)*

*Tiu poem-esperantigo trovighis sur la pagho 136 de la "Vestfaliaj Flugfolioj" eldonitaj de Richard Schulz (Rikardo Shulco). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`.

Johann Wolfgang von Goethe,

# Noktokanto de migranto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Vi, venanto de l' chielo,
Foriganto la doloron,
Freshiganta per mielo
De l' sufereganto koron,
- Min plenumas ega laco!
Kial tiu ghoj' kaj ve'? -
Dolcha paco,
Venu, mi sopiras tre!

*Traduko de la Germana poemo "Wanderers Nachtlied" de* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 1983-06-17.*

*MR-063-2 / Arg-738-1491 (2012-12-29 13:38:37)*